

La libro *Les Patries* de Jean Diedisheim, 5-a parto  
Claude Gacond, 204-a radioprelego, 1967.09.06 & 1967.09.09

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la pasintaj semajnoj ni komencis la prezenton de la libro *Les Patries [La Patrioj]* verkita de Jean Diedisheim, aŭtoro konata de la mondfederalistoj. Tiu libro estas interesa komplemento al *Interpopola konduto* de Edmond Privat, verko bone konata de la esperantista legantaro.

A.- Por Jean Diedisheim la koncepto patrio estas kripligita de post sia amalgamo kun la koncepto nacio. La nacia ŝtato povas evolui, ŝanĝiĝi aŭ eĉ malaperi; la patria sento tamen ne malaperos.

Cl.- Jean Diedisheim provas difini, kio propre apartenas al la nacio. En la patriotaj ceremonioj oni ofte havas kiel temon la karakteron de la patrio, la propran fizionomion de la nacio, kaj asertas, ke urĝas ilin gardi.

A.- Jean Diedisheim provas malkovri tiujn karakterojn aŭ fiziognomiojn de la nacioj. Ekzistas hodiaŭ 129 ŝtatoj. Ĉu por la homoj estas vere 129 manieroj agi, senti, kredi, laboradi, ami aŭ malami, sin distri, morti?

Cl.- Lia respondo estas, ke ekzistas tri miliardoj da manieroj, anstataŭ 129, kaj morgaŭ 6 miliardoj, tiom kiom da individuoj.

A.- Kia tragika naivaĵo vidi nur po unu por nacio!

Cl.- Ekzistas potencaj fluoj nutranta la homan psikon:

A.- simpatio aŭ ties malo, mon-avido, amo, familia sento, ambicio, ŝato al la metio, admiro al la naturo, arta kreemo, serĉado, studemo, ktp.

Cl.- Ĉu tiuj fluoj ricevas de la nacio ian decidigan influon? Analizo permesas al Jean Diedisheim doni nean respondon. Ni prenu ekzemplon:

A.- Ne estas hazardo, ke la impresionismo naskiĝis en Francio, kaj tie ankaŭ kulminis; ke genio kia Debussy subite reorientis la muzikon kaj renovigis ties esprimteknikon. Sed ĉu, se la franca nacia ŝtato, anstataŭ resti sendependa, estus forminta kun aliaj ŝtatoj unuiĝon, ŝtatkomunecon, ĉu tio estus malhelpinta Monet aŭ Ravel naskiĝi en Francio kaj estus ŝanĝinta ion al ilia genipovo?

Cl.- Oni povas fari al si samajn demandojn pri ĉiuj fakoj, de la folkloro al la scienco. Fine oni alvenas al la konvinko, ke ne ekzistas franca nacia folkloro, nek franca nacia scienco, nek franca nacia moralo, ktp.

A.- La naciaj limoj havas nenian haltigan influon super la homan psikon. Kiam oni fin-distilis la nocion nacia ŝtato kaj ties influpovon, tiam oni rimarkas, ke sole amo al la naskiĝa loketo estas sento universala, sento, kiu neniel rilatas kun naciaj limoj.

Cl.- Tiu sento favoris homajn solidarecojn, kiel ĉiuj komunecoj.

A.- En ĉapitro titolita **nacia ŝtato** Jean Diedisheim reliefigas, ke la ŝtato uzas tiun nebulan senton al loka solidareco por sia profito. La ŝtato kreas artefaritan solidarecon, kaj poste ĝi atendas de la ŝtat-loĝantoj, ke tiu nacia solidareco superu ĉiujn ceterajn solidarecojn, eĉ la supernaciajn.

La libro *Les Patries* de Jean Diedisheim, 5-a parto  
Claude Gacond, 204-a radioprelego, 1967.09.06 & 1967.09.09

Cl.- Se ekzistus en la mondo nur unu ŝtato, oni povus kompreni tiun superan regemon de la ŝtato. Sed fakte alfrontiĝas multaj superemaj naciaj solidarecoj, kiuj postulas absolutan obeadon al siaj loĝantaroj. Hodiaŭ ekzistas proksimume 129 tiaj solidarecoj.

A.- Ĉiu nacia ŝtato sin pretendas kaj deklaras absoluta mastro pri la propra konduto rilate al la aliaj naciaj ŝtatoj.

Cl.- Por nacio povas ekzisti nenia limigo, ekster la memvole konsentitaj.

A.- Pro tio nacio sin sentas rajtigita subite nuligi eĉ la plej solene subskribitajn kontraktojn. Rompo eĉ ne estas necesa. Simpla ignorado.

Cl.- Tiu konduto altiras nenan sankcion. Nur okazas vortŝutadoj aŭ voĉdonado de rezolucioj en senpovaj internaciaj forumoj, kies anoj estas diplomatoj.

A.- Al tiu rifuzo de supera kontrolo kaj trudo de nacia solidareco estas rezervata la nomo suvereneco. Ĝi estas la plej alta kaj valora kriterio pri la ekzistado de nacia ŝtato.

Cl.- Suvereneco vekas ĉe la homoj ebriigan senton. Pro tio tiu vorto suvereneco konstante revenas en la naciaj analoj ; suverena rajto, suverena aŭtoritato : jen sonoraj terminoj por simboliko kondukanta al potencemo kaj senbrideco.

A.- Nu, troviĝas, ke la endemiaj aŭ eksplodigaj malfeliĉoj de la homa raso, la militoj, la malsato por du trionoj de la mondo, senrimedas, graviĝas eĉ, pro tiu paraliziga koncepto pri ŝtata suvereneco.

Cl.- Jean Diedisheim en sia studo *Les Patries [La Patrioj]* lumigas per kiaj mekanismoj tiu koncepto venenas ĉian provon al racia kaj taŭga aranĝo de nia planedo. Pri tio ni parolos la venontan semajnon.

A.- Restas al ni unu minuto por saluti kelkajn geaŭdantojn : el Pollando ni ricevis poŝtkarton de nova aŭdanto nomata Franco Denkowski loĝanta en Nad-Stawem. Li aŭdas nin, kiel se ni starus en lia ĉambro.

Cl.- El Orienta Germanio salutis Ernst Muthschall loĝanta en Halle. Li trovis niajn prelegojn pri la vivo de Zamenhof treege interesaj. Vi sciu, ke la organo de SAT *Sennaciulo* publikigas tiujn tekstojn.

A.- Alice kaj Walter Peake en York, Britio, sciigas al ni, ke niaj temoj estas preparolataj en ilia grupeto.

Cl.- Tibor Tolnai en Hungario, ni ne kapablas prononci la nomon de lia loĝloko, tiu nova aŭskultanto ricevis instigon skribi al ni aŭdante nian babiladon kun niaj geaŭdantoj. Li havis la impreson, kvazaŭ ni kune sidadus en la sama ĉambro.

A.- Vi sciu, karaj geaŭdantoj, ke tiuj afablaj vortetoj estas por ni kuraĝigoj konstante plibonigi niajn elsendojn. Dank'al viaj poŝtkartoj kaj leteroj ni scias, al kiuj ni parolas, kaj ankaŭ ricevas la impreson sidi kun vi en agrabla kunveno.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-